Aleksandr Lesj

Suflorilo

Tradukis Gamliel Fiŝkin

Mallonga sciencfikcia rakonto, nun, en la dudek unua jarcento, ege aktualiĝinta kaj plu aktualiĝanta.

La originalo estis publikigita ruslingve en la sovetia revuo «Pioner'» (Пионер), 1990, numero 8, paĝoj 27—28. Tradukis en Esperanton Gamliel Fiŝkin (https://fishk.in/eo/).

Aleksandr Lesj
Suflorilo

— Mia instruisto! — respekte prononcis la malgranda Niko. — Mi plenumis ĉion, kion vi ordonis, kaj venis por plu lerni. Kiun lecionon ni havos hodiaŭ?

— La lastan, etulĉjo. — La maljuna Teno turnis al li sian fotelon. — Hodiaŭ ni havos la lastan lecionon pri la historio de la civilizo de la planedo Kalruno. Do, sidiĝu proksime kaj estu atenta: mi rakontos al vi... pri suflorilo. Ĉu vi memoras, kio ĝi estas?

— «Suflorilo, — volonte citis Niko, — estas papereto, sur kiu malfervora lernanto notas tion, kion li devis ekmemori, kaj poste ŝtelrigardas, respondante al sia instruisto».

— Ĝuste, etulĉjo. Komence ĝi vere estis sendanĝera peceto de papero — en formo

de eta balgo, spiralo, tubo… Pluraj generacioj de lernejanoj kaj studentoj de Kalruno artifikis sian inventemon, perfektigante suflorilon. Tiam tio estis pli ludo ol misfaro. Ludo per risko, per inĝenio… Ja por loki sur eta areo maksimumajn informojn kaj nerimarkeble por observemaj ekzamenantoj legi tion en la taŭga momento, oni bezonis talenton de miniaturisto kaj scipovon de iluziisto.

La ludo finiĝis, kiam oni ekuzis por kreo de sufloriloj fotadon. Ĝi ne nur solvis la taskon pri malgrandigo de la «kaŝaj konspektoj», sed ankaŭ permesis facile multobligi ilin. Rezulte naskiĝis nova metio — produktado de sufloriloj.

Dum ioma tempo la evoluo de suflorilo iris la vojon de perfektigo de kaŝiloj: oni muntadis ĝin en skribilojn, en butonojn, en horloĝojn… Tiaj helpiloj estis tre popularaj ĉe lernejanoj kaj ne tuj

malaperis eĉ kun apero de la elektronika suflorilo.

— Elektronika? — miriĝis Niko.

— Jes, etulĉjo. La progreso de la mikroelektroniko devis frue aŭ malfrue igi la suflorilistojn al tiu ideo. Tamen komence tio estis nur eta ricevilo-sendilo en formo de speciala orela korketo. La dua sendilo situis ĉe sufloranto. La skemo, kiel vi vidas, estis ankoraŭ sufiĉe maloportuna kaj bezonis, ke je dek pigruloj ekzistas unu diligenta lerninto, kiu pensas anstataŭ ili. Sed jam en la sekva etapo de la sufloriligo de klerigado oni alŝaltis la sendilon al granda komputilo, kaj poste oni kreis apartajn mikrokomputilojn, kiujn ĉiu povis kunporti maskitajn je kutimaj objektoj.

La novaj sufloriloj flustradis respondojn, konsiderante la plej novajn malkovrojn en koncerna tereno de scienco. Kostis tia

suflorilo grandegan monon, sed helpe de ĝi oni povis elteni eĉ la plej severan ekzamenon. Tuta generacio de lernejanoj kaj studentoj sukcese diplomiĝis, ne sciante siajn fakojn.

Tiuj homoj ankaŭ post diplomiĝo ne forlasis siajn suflorilojn. En uzinoj, institutoj, laboratorioj hieraŭajn studentojn atendis novaj testoj, kaj, por almenaŭ iel elteni ilin, oni bezonis tiujn kibernetikajn flustrilojn. Tiel la elektronika suflorilo paŝis el universitataj aŭditorioj en la vivon. La konspira metio de la suflorilistoj plu kreskis. Kalrunanoj bezonis universalajn suflorilojn kapablajn solvi vastan rondon de taskoj. La elektronikistoj kaj kibernetikistoj, okupiĝintaj pri tiu negoco, kreis ankaŭ tiajn aparatojn.

Facile ricevante diplomojn kaj progresante en sia ofico, homo preskaŭ nenion sciis, tial multaj uloj eĉ kun suflorilo foje

trafadis en embarasan situacion. Tiam la suflorilistoj inventis sonan almetaĵon, instalatan kiel kronaĵo sur denton kaj respondantan al demandoj per la voĉo de sia posedanto, — li nur bezonis movi siajn lipojn ritme al vortoj. La nova varo tuj iĝis vaste vendata.

Ĉar kalrunanoj deziris aspekti saĝaj kaj kompetentaj ne nur en laborejoj, oni ekuzis tiujn almetaĵojn ĉie. Per ili oni intelekte konversaciis dum vizitoj, en teatroj, surstrate. Deflanke ŝajnis, ke homoj diskutas, eldiras opiniojn, dubas, sed envere ili nur malfermadis siajn buŝojn, kaj konversaciis anstataŭ ili eletronikaj sufloriloj.

Vantaj gepatroj hastis akiri parolantajn suflorilojn por siaj malraciaj gefiloj, kaj ĉie unu post la alia ekis aperi mirinfanoj: ses-jaraj, kvinjaraj kaj eĉ trijaraj. Malfeliĉaj infanoj ekde frua infanaĝo mallernis

pensi — anstataŭ ili pensis elektronika-kibernetika cerbo, kaŝita en surkola bagatelaĵo. Modo je mirinfanoj disvastiĝis tra la tuta Kalruno, kaj jen post la generacio de malkleruloj kreskis generacio de idiotoj.

Ĉiuj ĉi eventoj ekis plej veinde influi la elektronikon kaj kibernetikon mem. La robotigita industrio akute bezonis spertajn fakulojn, sed ili estis ĉiam pli malmultenombraj, kaj eĉ tiuj transiradis al produktado de sufloriloj, ĉar tio estis profitiga.

Evoluo de elektroniko, samkiel de aliaj branĉoj, haltis. Funkciis nur konspira produktado de sufloriloj, sed ankaŭ ĝi baldaŭ ekis estingiĝi…

— Kial? — demandis Niko.

— Ĉar suflorilistoj estis maljuniĝantaj kaj mortantaj, kaj novaj de nenie povis aperi. Jes, estis ĉiam malpli da suflorilistoj, sed ili ne forlasis sian teruran metion. La

kalrunanoj daŭrigadis altintelektajn interparolojn, ofte jam ne komprenante tion, kio sonis el ilia propra buŝo. Foje ili forgesadis movi siajn lipojn ritme al vortoj, sed, ĉar al tiu tempo ĉiuj havis suflorilojn kaj konis ilian sekreton, tio mirigis neniun.

— Kaj poste, mia instruisto?.. Kio estis poste?

— Poste? — La maljuna Teno sulkigis siajn densajn brovojn. — Poste mortis la lasta el la suflorilistoj. Neniu plu povis produkti suflorilojn. Sed Kalruno jam estis tiel inundita per ili, ke tio malĝojigis neniun. Homoj plu konversaciis, estris kaj konsiladis, ne dispremante siajn dentojn.

Sed jen sufloriloj ekis panei. Ili paneadis ankaŭ antaŭe, sed tiam oni riparadis ilin. Nun estis neniu kiu povis ripari, ĉar jam neniu iom ajn memoris, kio estas elektroniko.

Paneo de suflorilo signifis por ĝia posed-

anto veran katastrofon — li ne plu povis partopreni saĝajn konversaciojn kaj estis devigata flankiĝi disde la socio. Tiaj homoj kunvenadis en apartajn grupojn kaj komunikiĝis per muĝado. La ceteraj ankoraŭ parolis, sed sufloriloj paneis unu post la alia, kaj poiome iĝis pli da muĝantoj ol da parolantoj.

Jam antaŭlonde forgesiĝis la metioj kaj forperdiĝis la skribado. La robotigita industrio ankoraŭ iel funkciis, provizante al la kalrunanoj manĝojn kaj vestojn, — ĝin administris malsimplaj elektronikaj-kibernetikaj kompleksoj, programitaj por jardekoj. Sed ankaŭ ili bezonis prizorgon kaj riparadon.

Finfine haltis ĉio. Plej longe funkciis nia Kunordiga Centro, sed ĝi ne povis revivigi la mortantajn uzinojn kaj nur konstatis ilian halton. Kiel estis mortanta ĝi mem, vi vidis, etulĉjo. Ĝuste tio estis la fino de la

civilizo de la planedo Kalruno.

Ĝis nun ni estis duopo en ĉi tiu morta templo de kibernetiko. Kaj mi instruis vin pri ĉio, kion mi sciis. Sed mi jam ne leviĝos el ĉi tiu operatora fotelo — mia energi-rezervo estas elĉerpita. Do, baldaŭ vi restos unusola. Via urana baterio ankoraŭ funkcios ĉirkaŭ dek jarojn, tial penu ne perei antaŭ via tempo. Ankoraŭfoje kontrolu, ĉu bone estas ŝlositaj la pordoj de la lifto. Timu humidecon, kaj, dum estas somero, trovu kaj obturu ĉiujn fendojn ĉe la etaĝo. Sufiĉe ofte anstataŭigu lubrikaĵon en viaj artikoj — en la sesa laboratorio estas plena cisterno da ĝi. Samloke estas baterietoj por la lanterno, en la granda bretaro malsup... — la maljuna roboto silentiĝis ĉe duonvorto, kaj lia kapo malrapide malleviĝis sur la ŝtalan bruston.

— Mia instruisto!.. Mia instruisto!!! — La malgranda Niko per ĉiuj siaj ses

manipuliloj skuadis la maljunulon ĝis kiam komprenis, ke tiu jam ne respondos. Iom starinte apud la senmova giganto, la malgranda roboto ekiris plenumi liajn lastajn instruojn.

En la koridoro estis elbatita unu vitro. Antaŭ ol fermi la aperturon per forprenita de la planko plato, la roboto rigardis eksteren.

Sube, en la verda puto de la korto, sur la disŝirita per impeta plantaro asfalto umis tri malpuraj, harkovritaj homoj. Du el ili turnadis bastoneton en kavaĵo en ligna ŝtipo, kaj la tria ion metadis tien. Baldaŭ super la ŝtipo aperis blua-griza fumeto. La homoj blekis aklaman kriegon.

Naskiĝadis nova scio.